La esperantistoj estas la sola grupo vendrede. Post la vespermanĝo ni ariĝas en salono, kie ni pasigas agrablan vesperon en diversaj ludoj: interkonaj ludoj por la tuta asembleo, proponataj de *Alois*, kaj poste porgrupetaj ludoj sur tabloj. Post bona nokto en plurlitaj ĉambroj, ni denove matenmanĝas trankvile. Ĉio estas preparita sur tablo laŭ la kutimo de memservo.

La programo de la mateno entenas interesan prelegon de nia nepala gastoj *Bharat*, kiu komentas fotojn de Nepalo sur ekrano, ankaŭ rakontas pri la vivo en sia lando. Sekvas la ĝenerala asembleo de la Germanoj. Dum tiu tempo, la Francoj povas promeni en la proksima arbaro kun kompetentulo pri plantoj, aŭ ripozi, aŭ ludi en salono. Mi partoprenas en strategia ludo kun Cyrille, Benedikte kaj la infanoj. Violette kaj Bruno prilaboras disvolviĝon de la venonta staĝo en *Saâles*.

Malpli trankvila estas la tagmanĝo, ĉar aliaj vizitantoj (turistoj) aldoniĝis, kaj ni devas vicumi, elekti ion en la proponita menuo, ricevi numeron, kaj atendi ĉe nia elektita tablo, vokon de nia numero por ricevi la menditan pladon.



frandi gastronomian pladon sed post atendo iom longa. Feliĉe ke esperantistoj ŝatas babilo por pasigi tempon !



Feliĉe la sid-lokoj sub arboj ekstere estas multnombraj, ni manĝas tre agrable, se ne rapide. Poste ni iras unue aŭtomobile, poste piede inter la vitejoj, kie *Anton Kiefer*, vitisto, kiu perfekte parolas esperanton, eksplikas la metodojn por kultivi vitejojn. Pli kaj pli la vinkultivistoj uzas naturajn rimedojn sen kemiaĵoj, metas seksajn allogaĵojn por trompi insektojn (-la masklo poste ne plu kapablas trafi la femalon !-), plugas la koridorojn inter la vit-linioj kun enterigo de la gazonoj, ktp...

Marŝante kaj babilante sub la suno, ni alvenas en Edenkoben, kie ni vizitas la muzeon de la vino (tre interesa loko, ne nur pri vino sed ankaŭ pri vilaĝa vivo).

Nun, jen ni en la propra bieno de Anton, kiu vizitigas la kelon, regalias nin per sia ellaborita „trinkaĵo” (aŭ minerala akvo, aŭ frukto-suko...). Poste piedirado al apuda restoracio, kie ni povas

Sekvas nova vizito ĉe Anton, sed ĉiŝoj por gustumi serioze kaj amplekse diversajn „nektarojn”... Entute dekkvino da elstaraj produktaĵoj estis proponataj, sed mi rezignis post la deka por ne ebriiĝi komplete !... . La vino stimulas nin, la Francoj kantas francajn kantojn, la Germanoj kantas germanajn kaj Bharat ne povas fari alie ol malkovrigi al ni nepalain melodiojn! Tion li faras bele kaj romantike. Sekvas eventuala aĉeto de elektitaj „allogaj” boteloj kaj ni denove veturas al Hüttenbrunnen kaj... tuj al niaj litoj, ĉar delonge noktas!...



Dimanĉe, post la matenmanĝo, denove en la speciala salono al ni dediĉita, kuŝas en la programo fino de la prelego de Bharat, dum la Francoj ĉeestas sian ĝeneralan asembleon. Jam la 11a horo! Grupiĝo en veturiloj kaj libera veturado direkte al *Trifels*, cele liberan elekton de restoracio kaj libera vizito de la kastelo. Pro troa amaso da homoj en la urbeto, tre turista loko, la organizantoj preferis tiun liberan programon, kaj tio estis tute prava, ĉar en homamaso oni ne povas resti grupe. Feliĉe ĉiuj grupetoj estas miksaĵoj de germanaj kaj franca staĝanoj, do esperanto daŭre funkcias kaj nature trovas sian lokon, kiel dum la tuta semajnfino.

Tiu mirinda kastelo meritis ja viziton... Krom mirinda panoramo, guinda post kelkcent metroj da „grimado”, interne de la impona konstruaĵo paneloj en la angla, franca kaj germana ebligas kompreni la aventurojn de *Rikardo Leonkoro* .

Okazis abunda babilado en esperanto dum la tuta staĝo, ĉar la ĉeestantaro estis duone germana duone franca, kun konstanta miksaĵo dum promenadoj, prelegoj, manĝoj, dormoj...

Jean-Luc sindoneme zorgis pri la libro-servo, kaj vendis kelkajn librojn, kvankam la homoj ne sufiĉe vizitis ĝin..

Resume, tre plaĉa, suna kaj bonetosa staĝo. Kelkaj ŝajnas bedaŭri, ke mankis ne-esperantistoj dezirantaj komenci en la lingvo, sed ni tamen povis reklami por esperanto ĉe la turistoj, kiuj aldoniĝis sabate en Hüttenbrunnen kaj ĉe la multnombraj vizitantoj de la kastelo Trifels. Mi esperas ke almenaŭ unu guto de nia entuziasmo iris ĝis ili !...

Ne forgesu la hejmpaĝojn <http://mulhouse.esperanto.free.fr> por havi ideon pri la etoso.!

Ginette MARTIN



Ĉu OFICIALIGO de Esperanto en RUSIO?

La 13-an de aprilo 2007, en Rusia Akademio pri Klerigo (Moskvo) okazis unika internacia konferenco "*Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj*".

La aranĝo estis iniciatita de Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco post la letero de *Eŭropa Jurscienca Universitato "Justo"*, kiu enhavis proponon enkonduki Esperanton en studplanojn de rusiaj klerigejoj.

Pluraj alparolantoj raportis pri esploroj, pruvintaj la propedeŭtikajn valorojn de Esperanto. Inter aliaj ekz. profesoro de la Nagoja Universitato *Morita Akira*, surbaze de siaj 40-jaraj spertoj emfazis, ke **anticipe studado de Esperanto efektive kaj reale helpas la japanajn studentojn en la posta lernado de fremdaj lingvoj.**

Reprezentanto de la Ministerio *Nelli Mihajlivna Rozina* rakontis, ke ne ekzistas grandaj resursoj por financi diversajn projektojn kaj eksperimentojn. Krome, ŝi opiniis, ke en Rusio ĝis nun ne estis faritaj signifaj kaj rekonitaj eksperimentoj, pruvantaj la propedeŭtikajn valorojn de Esperanto por lernado de fremdaj lingvoj.

En fino de la konferenco la ĉeestantoj akceptis rezolucion (la celo ja estis ĝuste tio), kiu baldaŭ estos sendita al la decidpova Ministerio pri Klerigo kaj Scienco.

Detala raporto pri la konferenco troveblas ĉe: - <http://planedo.ru/sobytia/konf>

Jen rapida traduko de la ĉefa bloko de la rezolucio : (... 11 argumentoj ...)

Surbaze de la (supre...) listigitaj argumentoj, la konferenco taksas necesa turni sin al *Ministerio de Rusia Federacio pri Edukado kaj Scienco* kun la propono subteni la enkondukon de eksperimentoj en Rusio por disvolvi kaj konfirmi la valorojn de propedeŭtikaj valoroj de Esperanto, kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanton al la studplanoj de klerigaj instancoj de Rusio egalrajte kun ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj, kiel propedeŭtika ilo antaŭ la eklernado de fremdaj lingvoj.

Preciza origina teksto troveblas ĉe: - http://www.planedo.ru/images/aprilo_2007/rezolucija.html

Fontoj:

- [E-rus-info]

- <http://planedo.ru/sobytia/konf>

Interasocia Kongreso en Bourg-en-Bresse

Bourg-en-Bresse, la ĉefurbo de departemento Ain, akceptis la Inter-asocian Esperanto-Kongreson la 25-29ajn de majo 2007. Kongresis tie Espéranto-France, Espéranto-Jeunes, GEE, Espéranto Rhones-Alpes.

Pli ol 160 personoj partoprenis tiun kongreson, bone organizita de la loka grupo. La kongresejo troviĝis en la urbofestejo ĉe la urba teatro. Aliaj lokoj estis ankaŭ uzataj, MJC por koncertoj kaj Foyer 3 Saules por la manĝoj. Jam vendrede vespere okazis la inaŭgura prelego.

S-ino Rodica Todor el Rumanio prezentis interesajn fotojn pri sia lando Rumanio kaj ankaŭ pri Moldavio. Ŝi emfazis la historion kaj tradiciojn de sia lando.

Aparte interesa estis la sabat-matena programo kun kontaktoj kun ĉina lernejo. Per video-skajpa instalaĵo, komputilo, ret-kamero, mikrofono, video-projekciilo kaj ekrano, eblis interkomuniki voĉe inter tiu klaso kaj la ĉeestantoj en Francio. Sur granda ekrano eblis vidi la klason, la diversajn parolantojn en la urbo Zhenjiang de la provinco Jiangsu en suda Ĉinio. Certe la bildoj ne estis tute klaraj, eble nur unu aŭ du bildoj po sekundo.

En la lernejo ĉeesti ne nur la infanoj, sed ankaŭ la gepatroj, kiuj subtenis siajn gefilojn, kaj ankaŭ la geinstruistoj. Michel Fontaine, en Ĉinio, gvidis la konversacion kaj s-ino Xueqin interpretis al Esperanto kaj al la ĉina lingvo.

Ĉinaj infanoj regalis nin per diversaj muzikaĵoj kaj kantoj. En Francio la grupo *Kaj Tiel Plu* el Barcelono interpretis por la ĉinaj partoprenantoj kelkajn kantojn el sia repertuaro. Ankaŭ ni ĝue aŭskultis la junajn ĉinajn gelemantojn, kiuj salutis nin per simplaj kaj simpatiaj frazoj. Ili lernas la lingvon de du jaroj.

Ni gratulis kaj dankis al la infanoj, al la gepatroj, kaj al geinstruistoj, kiuj gvidas la Esperanto-kursojn kaj organizis tiun skajpan renkontiĝon.



Ĉina lernantino.




La ensemble KAJ TIEL PLU

En la posttagmezo okazis diversaj laboro-kunvenoj de la partoprenantaj asocioj kaj divers-gradaj ekzamenoj. Ĝenerala Asembleo (ĜA) de la Rodan-alpa Federacio, de GEE (Groupe des Enseignants Espérantophones), franca sekcio de ILEI ktp...

Vespere okazis du koncertoj. La paro *Duoble Unu* interpretis kelkajn kantojn de sia aperonta K-disko *SEN LIM' ĜIS*. Ĝi konsistas el 12 tre diversaj kaj popularaj kantoj.

Poste venis al la scenejo 6 muzikistoj/kantistoj de la kataluna ensemble *Kaj Tiel Plu* el Barcelono. Ili kantis en Esperanto kaj en la kataluna lingvo. Iliaj muzikoj kaj kantoj estis tre agrablaj kaj ravis la ĉeestantojn, inter kiuj, kelkaj neesperantistoj, en plena salono de MJC.



Dimanĉe matene, malgraŭ iom nuba ĉielo kaj kelkaj pluv-gutoj, okazis la ceremonio por la inaŭguro de la arbo de PACO en la parko Monnet. Fakte la arbo de paco estas fosto kun pluraj indik-paneloj kun la vorto PACO en pluraj lingvoj. La plej supra estas en Esperanto. Infanoj tenis flagon kun la vorto PAIX.

Urba reprezentanto alparolis la ĉeestantojn. En la



"Arbo" de Paco



franca kaj en Esperanto respondis al li Bruno Flochon, prezidanto de Esperanto-France. Antaŭ la ceremonio li estis intervjuita de ĵurnalisto. Krome la kongresa koruso agrablis la ceremonion per diversaj kantoj antaŭ la "arbo" de PACO.



La pikniko planita en la parko estis translokigita al salono en la Festejo pro maloportuna vetero. Malgraŭ tio, ĝi okazis en simpatia etoso. Poste, tamen povis okazi vizito al urbo, kie ni malkovris interesajn historiaĵojn kaj ĉarmajn internajn kortojn.

En la MJC koncertis Martin Wiese el Svedio el la konata ensemblo *Personne*. Li montris al ni sian talento pri akustika roko.

La vespero finiĝis per societaj ludoj.

André Grossmann



Dum la vizito al la urbo Bourg-en-Bresse, ni trovis ĉarmajn mur-pentraĵojn, kiuj iel trompas la okulojn. Jen unu el ili. Ĉu vi sukcesas rekoni, kiuj el tiuj personoj estas pentritaj kaj kiuj ne. Bonan observadon.



Libro-Foiro en Saint-Louis

Dum 3 tagoj, la 11-12-13ajn de majo 2007 okazis en Saint-Louis granda Libro-Foiro. Dank'al iniciato de Simone Kiry kaj subteno de Esperanto France-Est, nia asocio "Mulhouse-Esperanto" sukcesis ekhavi tie budon por tiuj 3 tagoj.

Jam vendrede matene ni instalis nian materialon sur la jam pretaj tabloj kun tablo-tuko. Tiam ankaŭ helpis nin Nicole Béroud el la Bazela Grupo.

Unu-flanke ni prezentis multajn librojn en Esperanto kaj kelkajn en la franca, tradukoj el Esperanto aŭ pri la internacia lingvo.

Ali-flanke ni havis multajn prospektojn "Langue Equitable", pri la venonta oktra staĝo en Saâles kaj pri nia Perkoresponda Kurso. Ni proponis akiri la kompaktdiskon "Lernu", la DVD-on "Esperanto-Elektronike" kaj la novan libreton "Poŝamiko". Ĝi estas nur en Esperanto, sed eĉ ne-esperantistoj akiris ĝin.

Multaj homoj ja iam aŭdis pri Esperanto, sed miris, ke ĝi ankoraŭ ekzistas. Kelkaj tamen nenion sciis kaj neniam aŭdis pri la lingvo.

Ni esperas, ke ni sukcesis bone informi la publikon, kiu pretis akcepti niajn klarigojn.


Ni sukcesis ankaŭ vendi iom da libroj, Metodon 11, bildrakonton de Tinĉjo.

Krome ankaŭ vizitis nian budon aliaj membroj de nia grupo. Iuj eĉ akceptis iom anstataŭi la deĵorantojn.



Frédéric kaj Edmond deĵoris sabate posttagmeze

André Grossmann



SAINT-LOUIS
Alsace
www.foirelivre.com

24^e FOIRE DU LIVRE

11, 12 et 13 mai 2007

Buchmesse


MULHOUSE-
ESPERANTO



Simone diligente deĵoris dum la 3 tagoj

Libro pri malnova Japanio Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo

Jen interesa kolekto de rakontoj de maljunaj homoj vivantaj en orienta japana urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en jaroj inter la fino de la 19a jarcento ĝis la okdekaj jaroj de la 20a jarcento. Inter la rakontantoj de sinjoro Saga, troviĝas tinkturisto, produktisto de tofuo, entreprenisto, rizvendisto, rivera transportisto, geĵŝo, instruistino, fiŝisto ... Entute pli ol 50 personoj. Ĉiuj tiuj homoj konis malnovan Japanion, spertis ŝanĝojn, kiujn alportis modernigo, kaj ekkonis abundecon. Sincere ili rakontas pri sia vivo - foje triste, foje amuze, foje terurige, tamen neniam sensacie. Per tiu ĉi libro la aŭtoro havis esperon almenaŭ parte forigi la abismon, kiu dividas malnovan Japanion de la nuna.



La libron tradukis Judyta Szczerbicka-Yamoto, la multnombraj ilustraĵoj estas de Susuma Saga.

Ĝi kostas 26 eŭrojn inkluzive kun sendkostoj. Por eviti altajn sendo-kostojn ĝi estos rekte sendata al vi el Pollando, kie ĝi estis presita.

La libro estas mendebla ĉe nia asocio, pere de nia kasisto:

André Grossmann,
5, rue des Pyrénées,
68390 Baldersheim.

Ĉekojn je la nomo de:
Esperanto France-Est,
CCP 1997 72W Nancy

Amika tago kaj migrado en la Nigra Arbaro en junio 2007



Supre de Staufen elstaris tiu ruino

Dimanĉe la 10an de junio okazis la amika tago en la Nigra Arbaro, kun planoj grimpi telfere ĝis la mont-supro de Belchen. Tamen la vetero ne estis tute favora. Matene pluvegis sur la germana aŭtoŝoseo kaj 10 km de tie en Staufen, nia rendevuejo, la stratoj estis sekaj sen ia ajn pluvo. Tamen la monto-suproj estis kaŝitaj de densaj nuboj. Ursula Niesert, la organizantino, devis adapti la programon al tiuj cirkonstancoj.

La programo estis do ŝanĝita. La urbeto Staufen ja estis tre ĉarma. Ni vizitis ĝian bazaron kaj poste la ruinon supre de la urbeto. Poste iom da migrado ni atingis la supron. Tie el la ruino eblis admiri la mirindan panoramon.




Ĉu pluvo aŭ suno?

Nur poste, ĉiuj kune veturis al piknikejo. Alia ol unue planita. Ni trovis oportunan lokon por starigi du tablojn kaj tie agrable manĝi kunportitajn manĝaĵojn. Iuj uzis arbo-trunkon kiel benkon.



Paul Finus, ĉiam spertas pri botaniko, tial li spontane proponis migradon por malkovri plantojn, arbojn. Helpe de sia botanika libro, li povis klarigi pri la plantoj kaj doni la nomon en la germana, en Esperanto kaj eĉ en la franca.



Ĉe la stacidomo de Staufen, monumente staris tiu pra-biciklo



Ursula daŭre improvizis novan programon laŭ la nombro da nuboj en la ĉielo. Efektive la vetero pliboniĝis, jam videblis la mont-suproj. Tamen jam ne eblis grimpi al Belchen (je 1414m), sed almenaŭ ĝin admiri.

Ni kune veturis al montara vilaĝo St Ulrich tra apuda valo kaj fine atingis lokon, kie eblis

admiri vastan panoramon al Belchen, al Schauinsland (je 1284m) kaj eĉ al la urbo Freiburg.

Laste ni trovis oportunan restoracion, kie plej multaj pretis vespermanĝi. Ni dankis al ursula, kiu ja havis zorgojn agrablighi tiun tagon por ĉiuj partoprenantoj.

André Grossmann



Fotoj: André Grossmann



Reinhard Selten: Mehr Identität für Europa

de Redakcio - Laste modifita: 2007-05-17



La 9-an de majo, en la *Eŭropa Tago*, EU solenis la kvindekjariĝon de la *Roma traktato* kaj invitis nobelpremiitojn paroli en la *Eŭropa Parlamento*. Inter ili troviĝis la esperantisto **Reinhard Selten**, kiu ricevis la premion pri ekonomiko en 1994. En sia parlamenta parolado li argumentis por la bezono de plia ekonomia integriĝo kaj fortigo de la eŭropa identeco. Ĉefa malhelpo por komuna eŭropa identeco laŭ li estas la lingva baro, **kiun oni povus malaltigi per lernado de Esperanto** kiel la unua fremda lingvo.

Libera Folio kiel la unua amaskomunikilo en la mondo publikigas la kompletan tekston de la parolado. Ni dankas al la gazetara servo de la *Eŭropa Parlamento*, kiu provizis sonregistraĵon de la parolado de Reinhard Selten

“ Meine Damen und Herren!

Es ist mir eine Ehre und eine Freude heute zu Ihnen zu sprechen.

In den 50 Jahren seit den Römischen Verträgen hat die wirtschaftliche Integration erstaunliche Fortschritte gemacht. Es hat sehr lange gedauert, aber es sind fundamentale Veränderungen politisch durchgesetzt worden. Vieles wurde lange Zeit für unmöglich gehalten, wie zum Beispiel die Währungsunion. Die Währungsunion hat sich als großer Erfolg erwiesen. Das ist nicht zuletzt der Unabhängigkeit der europäischen Zentralbank zu verdanken und ihrer Verpflichtung auf das Ziel der Geldwertstabilität.

Ein neuer europäischer Grundvertrag wird vermutlich anstelle der europäischen Verfassung durchgesetzt werden. Ich hoffe, dass die Unabhängigkeit und die Aufgabenstellung der Zentralbank dabei unverändert erhalten bleibt. Die wirtschaftliche Integration ist freilich noch nicht abgeschlossen.

Die kartellrechtlich unbedenkliche Übernahme eines New-Yorker Stromanbieters durch einen kalifornischen Stromanbieter würde in den USA kein politisches Aufsehen erregen. In Europa sind wir noch nicht soweit.

Es ist notwendig das Entstehen einer stärkeren europäischen Identität zu fördern. Die Europäer müssen lernen sich in erster Linie als Europäer zu fühlen.

Ein wichtiges Hindernis auf dem Weg zu einer starken europäischen Identität sind die innereuropäischen Sprachbarrieren. Dieses Sprachproblem bedarf einer Lösung. Die Dominanz einer Nationalsprache kann nicht die Antwort sein. Auf die Dauer ist nur eine neutrale Lösung akzeptabel. Keine Nation darf benachteiligt werden.

Eine leicht erlernbare Plansprache wie Esperanto ermöglicht eine neutrale Lösung des Sprachproblems. Eine zweite Fremdsprache wird sehr viel leichter erlernt als die erste. Der Zweitspracheffekt ist so stark und Esperanto ist so leicht, dass es günstiger ist erst Esperanto zu lernen und dann eine nationale

(vidu finon paĝo 22)

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Estas por mi honoro kaj ĝojo paroli al vi hodiaŭ.

En la 50 jaroj post la Traktato de Romo la ekonomia integriĝo mirinde progresis. Daŭris tre longe, sed fundamentaj ŝanĝoj estas politike plenumitaj. Multon oni longe rigardis kiel neblan, kiel ekzemple la Mona Unio. La Mona Unio montriĝis granda sukceso. Tion oni devas aparte danki al la sendependeco de la Eŭropa Centra Banko kaj al ties devo resti ĉe la celo de mona stabileco.

Kredeble oni decidis pri nova Eŭropa baza traktato anstataŭ la Eŭropa konstitucio. Mi esperas, ke tiam restos senŝanĝaj la sendependeco kaj taskoj de la Centra Banko. La ekonomia integriĝo certe ne estas kompletigita.

La karteljure neriproĉebla transpreno de Nov-Jorka elektroprovizanto fare de Kalifornia elektroprovizanto ne kaŭzus politikan ekscitiĝon en Usono. En Eŭropo ni ankoraŭ ne pretas por io tia.

Necesas stimuli la ekeston de pli forta eŭropa identeco. La eŭropanoj devas lerni senti sin unuavice kiel eŭropanoj.

Grava malhelpaĵo sur la vojo al pli forta eŭropa identeco estas la lingvaj baroj ene de Eŭropo. Tiu lingvoproblemo postulas solvon. La superrego de unu nacia lingvo ne povas esti la solvo. En la longa daŭro nur neŭtrala solvo estas akceptebla. Neniun nacion ni rajtas malavantaĝigi.


Facile lernebla planlingvo kiel Esperanto ebligas neŭtralan solvon de la lingvoproblemo. Duan fremdlingvon oni lernas multe pli facile ol la unuan. La dualingva efiko estas tiom forta, kaj Esperanto tiom facila, ke estas pli favore unue lerni Esperanton kaj poste nacian fremdlingvon, ol nur tiun fremdlingvon solan. Tio estas science pruvita per lernejaj testoj.

Unue kelkaj landoj povas fari traktaton pri lerneja instruado de Esperanto. Poste oni povos vastigi tiun traktaton al aliaj landoj. La vojon de traktatovastigo oni plurfoje iris sukcese, ekzemple pri la Schengen-Traktato kaj la Mona Unio.

Mi dankas pro via atento!

Le groupe enfants "espéranto" de QUETIGNY - 21800 - (CSC Léo Lagrange) a créé son site !...

<http://biro.daniel.club.fr/index.html>



L'idée vient des enfants qui souhaitent créer "leur" site. Reprise au vol par les animatrices (-teur), la date du 12 Mai fut retenue. Ce jour-là, les quatre filles étaient là, manquait juste Amaël, le garçon du groupe. La veille, Daniel (l'un des animateurs) avait préparé la première page et la journée a pu commencer par l'ouverture sur internet de cette "hejmpaĝo" sur laquelle apparaissaient le nom des participantes : ne restait plus qu'à "faire" !

Donc, après quelques explications, chacune a fait le plan de "sa" page, puis a dessiné. Avec l'assistance des animatrices, elles ont ensuite écrit quelques lignes en espéranto. Enfin, avant le repas, elles ont fait leur "reportage photo". Pendant le repas (pris en commun à Léo), Daniel a scanné les dessins et les textes, puis chargé les photos dans l'ordinateur. En début d'après-midi, chacune son tour, les filles ont mis en page avec Daniel. Et à 4 heures, le site était fait ! Pour faire le site, nous avons utilisé un logiciel pour les "nuls" (*Composer* qui est intégré à *Mozilla*). Le site est génial avec *Mozilla* -un peu brouillon avec *Explorer* qui est stupide et ne comprend pas tout -

Coté matériel, il y avait sur place un ordi portable, un appareil-photo numérique, une imprimante-scanner, des crayons de couleur, des feutres... et bien sûr des dictionnaires !

Merci à ceux qui ont donné un coup de main : Anne-Marie, Annette, Manon, Alain, Sylvain ...

Amitiés, Daniel



Toso da kafo

Kia? Toso da kafo - malkaŝo
Kiom? Toso da kafo - malkaŝo
Tuta da kafo Plato da frumoj, Saĝo da oĝetojaj
Okorolo da Zokolado, Skarletilo da Almetoj, Peco da torto, Bakojo da kofino, Saĝo da fruktoj
Glaso da vino, Botelo da vino, Vesto da boteloj, Vesto da pomoj, Karto da fruktoj
Kerilo da lino, Substato da lakto, Stipilo da linoj, Inerato da linoj, Vazo da linoj

- 20 -

Poŝamiko

**Nova eldonaĵo verkita de B. Allèe kaj
K. Kováts, eldonita de edukado.net**

La kajereto entenas kolekton de ekzercoj kaj memorigiloj, kiuj pretiĝis laŭbaze de materialoj el la **METIEJO** kaj **LERNILOTEKO** de **edukado.net**.

La poŝforma eldonaĵo (A6) ne estas strukturigita lernolibro laŭ la klasika senco. Ĝin konsistigas

gramatikaj resumoj, tekstetoj, kelkaj ekzercoj kaj laŭtemaj bildvortaroj riĉe kolorilustritaj.

La vinktita libreto estas 40 paĝojn (mal)granda kaj praktika. Ĝi bone povas servi kiel poŝlibreto helpa al infanaj aŭ plenkreskaj kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbocelaj donacoj kaj propagandiloj.

Komence de septembro estis presita la dua eldono en 1000 pliaj ekzempleroj, kaj en en marto 2007 ni eldonis la 3an eldonon en pliaj 1000 ekzempleroj.

Heligaĵo

la lago
la lago
la lago
la lago

kiu? Kiam tematoj, kneskoj, li
kie? Kiam mi tro laboras, ti
kio? Kiam li gajnis monon, li
kio? Ne tra drinko, vi
kio? Nun estas vespero, baldaŭ
kio? Morgaŭ matene devos


la lago
la lago
la lago
la lago

kiu? Bonvolu
kio? Kiam oficias eniras, soldatoj
kio? Post longa studado li kunasisto

La libreto kostas 6,50 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe nia asocio, pere de nia kasisto:

André Grossmann,
5, rue des Pyrénées,
68390 Baldersheim.

Ĉekojn je la nomo de:
Esperanto France-Est,
CCP 1997 72W Nancy



NANCY

Espéranto-Nancy
MJC Desforges
 27, rue de la République
 54 000 Nancy

“ L'Espéranto ou l'utopie d'une langue universelle ”



Tio estas la titolo de la prelego de du studentoj el la IUT (Universitata Teknologii-Instituto) Charlemagne de Nancy.

Charlène Lepage kaj Sébastien Didier prezentis sian laboron, kiu donos al ili poentojn por akiri sian diplomon en fako "Esprimado kaj komunikado".

La prelego, pere de "Powerpoint", okazis je la 18a de majo antaŭ ĉirkaŭ 30 personoj. Sekvis debato, kiam ili respondis al multaj interesaj demandoj. Ĉiu partoprenanto ricevis broŝureton kaj povis aŭskulti la kantiston Jomo kaj Radio-elsenderojn.

La konkludo aludis dirojn de Christian Garino, kiu deziris kandidatiĝi je la prezidenta baloto.

komunikas Liliane BERSWEILER

LA MONDO GRATULAS SAMARKANDON

Karaj geamikoj,



La 17-an de majo, honore al la *Internacia Tago de Muzeoj*, en la Samarkanda Ŝtata Muzeo, ni inaŭguris la novan internacian ekspozicion "La Mondo Gratulas Samarkandon", dediĉe al 2750-jara jubileo de nia hejmurbo. Rigardu la ruslingvan materialon ĵus aperintan ĉe la tutlanda Interret-portalo:

<http://culture.uzreport.com/news.cgi?lan=r&id=32136>

<http://culture.uzreport.com/news.cgi?lan=r&id=32136&print=y>

La inaŭguran ceremonion partoprenis kaj salutparolis ankaŭ esperantistoj el Svislando kaj Francio. La inaŭguro estis filmita kaj kelkfoje montrita de la televido. En aŭgusto ni planas pliampleksigi la ekspozicion per la nova sekcio "Samarkando en Ĉiuj Kontinentoj".

Refoje dankon por via kunlaboro.

Ĝis revido en. . . 2750-jara Samarkando!

Restas kun amikeco,

Anatoli Ionesov

Anatoli Ionesov, Direktoro de la Muzeo de Paco kaj Solidaro
 P. O. Box 76, UZ - 140100 Samarkando Respubliko Uzbekistano
 Telefona/ fakso: +998 (66) 2331753.

Interreto:

<http://peace.museum.com>

<http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html>


http://www.esperanto-sat.info/article.php3?id_article=357

<http://www.civilsoc.org/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm>

Retadreso: imps86@yahoo.com aŭ

imps@rol.uz (kutime por mesaĝoj en simpla TEKSTA (.txt) formato, SEN suplementoj)

Lingvoj por la tuta vivo



En 2001, la *Eŭropa Jaro de Lingvoj* estis sukceso. En 45 landoj, milionoj da personoj partoprenis aktivaĵojn por celebri la lingvan diversecon kaj la gravecon kapabli paroli aliajn lingvojn.

Multaj personoj, junaj kaj malpli junaj, estis invitataj malkovri novan lingvon, aŭ speciale fieri pro siaj lingvaj konoj.

La respondeculoj pri lingvolernado kuraĝigis plifaciligi la lernadon de ĉiam pli larĝa kolekto de lingvoj kaj subteni la politikajn projektojn kiuj celas tion stimuli.

La Konsilio de Eŭropo proklamis la 26-an de septembro la ĉiujara Eŭropa Tago de Lingvoj.

Kial ni bezonas la *Eŭropan Tagon de Lingvoj* ?

Kvankam multaj homoj samopiniis pri tio, ke ni ĉiuj devus paroli alian fremdan lingvon, en multaj landoj fakte ne pli ol la duono de la loĝantoj scipovas duan lingvon.

Neniam antaŭe estis tiom da okazoj labori aŭ studi en aliaj eŭropaj landoj, sed la manko de lingvaj konoj malhelpas multajn personojn eluzi tiujn okazojn.

Pro la ekonomia tutmondiĝo kaj la internacia strukturo de multaj entreprenegoj pli kaj pli necesas scipovi aliajn lingvojn por efike labori ankaŭ en la propra lando.

Eŭropo posedas veran lingvotrezoron : pli ol 200 eŭropajn lingvojn, sen enkalkuli tiujn, kiujn parolas personoj devenantaj de aliaj kontinentoj. Tiu grava kapitalo devas esti agnoskata, uzata, gardata.

Lerni lingvon bonegas por ĉiu, de kiu ajn aĝo ; neniam estas tro malfrue por profiti de lingvolernado kaj de la perspektivoj, kiujn ĝi malfermas. Lerni la lingvojn de aliaj popoloj helpas nin pli bone kompreni unu la aliajn kaj superi la kulturajn diferencojn.

Kion celas atingi la *Eŭropa Tago de Lingvoj* ?

- Atentigi la ĝeneralan publikon pri la graveco de lingvolernado
- Konsciigi al ĝi la ekziston kaj valoron de ĉiuj lingvoj parolataj en Eŭropo
- Popularigi la tutvivan lingvolernadon

Kiel mi povas partopreni?

- Transdonu la informojn pri tiu *Tago* al laŭeble plej multaj personoj, inklude amikojn, kolegojn kaj samideanojn, parolu pri ĝi dum kunvenoj, sendu artikolojn al lokaj gazetoj kaj taŭgaj paĝaroj. Sugestoj por tion fari troveblas sur tiu ĉi paĝaro. La spertoj de la *Eŭropa Jaro de Lingvoj* en 2001 montras, ke oni atingas multe pli bonajn rezultojn, se oni agas grupe. La *Tago* estas la okazo daŭrigi kaj plifortigi la rilatojn kun lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj partneroj.
- Organizu eventojn : la partneroj de la *Jaro de la Lingvoj* sukcese organizis milojn da eventoj, de simpla kluba alparolado al ĝis eventegoj envolvante tutajn urbojn. Elektado de praktikaj ideoj por ĉiu situacio, kune kun aldonaj informoj, estas havebla ĉe la paĝaro de la *Konsilio de Eŭropo*.

Reta ligilo per kiu vi havos originalan tekston : www.ecml.at/edl/default.asp?t=materials

L'opinion de Roger Martin du Gard (citée dans *le Petit Robert*) : “ *L'adoption de l'espéranto... faciliterait entre les hommes les échanges spirituels et matériels* ”

(sekvo de la paĝo 17)


Fremdsprache, als nur diese Fremdsprache allein. Das ist durch Schulversuche wissenschaftlich erwiesen.

Zunächst könnten wenige Länder einen Vertrag über den Schulunterricht von Esperanto schließen. Später könnte der Vertrag auf unsere Länder ausgeweitet werden. Der Weg der Vertragsausweitung ist mehrmals erfolgreich beschritten worden. Zum Beispiel mit dem Schengen-Abkommen und der Währungsunion.

Vielen Dank für Ihre Aufmerksamkeit.

Pri Centjariĝo de UEA

Estimataj geamikoj,



Kiel vi scias la jaro 2008 markos **la centjaran jubileon** de *Universala E-Asocio*, fakto kiu donas kadron pripensi nian pasintecon kaj estontan agadon favore al Esperanto.

Okaze de tiu ĉi jubileo la estraro de UEA decidis *kongresi en Roterdamo 2008* kaj organizi aliajn eventojn, kiuj prezentu nian Asocion tute malferme al vasta publiko.

Aliflanke, jam estas konate ke la jaro 2008 estis difinita de UN kiel *Internacia Jaro de la lingvoj*, kio donas al ni okazon pli centriĝi niajn agadojn rilate al tiu ĉi temo. Ligon al la franca versio de la gazetararo komuniko de UN estas konsultebla en la jena adreso: (ankaŭ troveblas en aliaj lingvoj)

<http://www.un.org/News/fr-press/docs/2007/AG10592.doc.htm>

La tuta teksto de la decido de UN estas trovebla ĉe:

<http://www.uea.org/dokumentoj/UN/index.html>

Cetere, estas reale, ke tiel vasta plano ne povas efike efektiviĝi internacieskale sen via partopreno kiel landaj kaj lokaj organizoj. De via rolo kaj agado multe dependas, ke la centjariĝo de UEA estu vera internacia jubileo.

Tiu ĉi letero celas instigi vin profiti tiun ĉi jubilean jaron por informa kaj varbo-kampanjo laŭ viaj propraj eblecoj kaj homfortoj. Viaj iniciatoj diskonigindas kaj kontribuos al nia komuna celo.

Amike

Maritza Gutierrez González

estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado

retadreso: mgglez@enet.cu

el [landa agado]

fonto: Ret-info: <http://www.eventoj.hu>

Nova literatura periodaĵo lanĉota!



En septembro aŭ komence de oktobro 2007 estos lanĉita nova literatura periodaĵo, kiu komence aperos eble unufoje jare (sed verŝajne dufoje) kaj nomiĝos

Beletra Almanako (BA).

Ĝin redaktas

- Jorge Camacho (ĉefredaktoro),

- Probal Daŝgupto kaj István Ertl (redaktoroj).

Ĝin eldonas *Mondial* (Novjorko).

La kultura panoramo de Esperantujo prezentas signojn de stagno. "Fonto" ĉesis aperi. Necesas nova internacia literatura revuo. Tamen la tempo ankoraŭ ne maturas por lanĉi paperan revuon monatan aŭ du-monatan. Pro tio ni decidis publikigi **Beletran Almanakon** (ĉi-sekve **BA**).

Principe, la almanakon oni ne devos aboni anticipe kiel revuon, sed povas mendi aŭ aĉeti kiel libron. BA aperos en normala mezgranda libroformato, kaj ĝi estas facile mendebla, pagebla, aĉetebla, recenzebla aŭ donacebla al amikoj.

Vi jam nun povas antaŭmendi BA 1, je specialaj (rabatitaj) kondiĉoj (vidu malsupre). Ĝi verŝajne ampleksos inter 120 kaj 160 paĝoj.


BA enhavos diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. Laŭ interkonsento kun UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en la *Belartaj Konkursoj* aperos en BA. Aperos en BA materialo speciale verkita por ĝi, sed ankaŭ altkvalitaj tekstoj jam pli frue aperintaj en la reto sed ne surpapere.

Antaŭmendi BA 1 (Beletran Almanakon, n-ro 1)

La probabla prezo de BA1 estos 9 eŭroj. Aldoniĝas sendokostoj (ekzemple al Eŭropo 4,50 eŭroj ŝipe, aŭ 8,20 eŭroj aere). Se vi antaŭmendas nun (aŭ ĝis la fino de aŭgusto), vi ricevos BA1 por 6 eŭroj (plus sendokostoj), sendepende de kio estos la fina prezo de la almanako.

Por pli da informoj kaj retaj antaŭmendoj: <http://www.librejo.com>

fonto: Ret-info: <http://www.eventoj.hu>



... el nia leterkesto ... elektronika !

Saluton,

Ĉi foje ĉe **Evene** (mallongigo de *événement* = evento), kadre de intervjuo kun *Mélanie Carpentier* kaj *Jean-Nicolas Berniche*
<http://www.evene.fr/celebre/actualite/interview-alain-rey-festival-du-mot-robert-819.php>

[... / ...]

Et un projet de langue unique, comme l'espéranto ?

Kaj (pri) projekto de unika lingvo, kiel Esperanto ?

Alain Rey :

Je pense que c'est un projet utopique. C'est une très bonne idée, mais je ferai une critique. Ce n'est pas universel du tout, puisque c'est une langue aux racines européennes et latines. Parce que même l'anglais découle en grande partie du latin : on dit qu'il y a des anglicismes dans le français, mais il suffit d'ouvrir un dictionnaire d'anglais pour constater le grand nombre de mots qui, même s'ils n'ont pas le même sens, ont la même forme.

Mi opinias, ke temas pri utopia projekto. Tio estas tre bona ideo, sed mi faros kritikon. Ĝi tute ne estas universala, ĉar ĝi estas lingvo kun radikoj eŭropaj kaj latinaj. Ĉar eĉ la angla fontas grandparte el la latina : oni diras, ke estas anglismoj en la franca, sed sufiĉas malfermi vortaron de la angla por konstati la grandan nombron da vortoj kiuj, eĉ se ili ne havas la saman sencon, havas saman formon.

[.../...]

=====

Do, iom pala argumentaro. Espereble ankaŭ anglalingvaj esperantistoj reagos :

Amike,

Henri MASSON
SAT-Amikaro

(el la redakcio de "La Informilo" : ni taksas interesa la reagon de nia samideanino Renée TRIOLLE ...)

De: triolle.renee <<mailto:triolle.renee@wanadoo.fr>>

Al: redaction@evene.fr <<mailto:redaction@evene.fr>>

Sendita: Mer 06 06 07 08:15

Temo: *Alain REY et l'espéranto*

Madame ,

Alors qu'Alain REY fait figure de grand linguiste devant l'éternel, il devrait savoir qu'une langue n'est pas qu'une collection de racines... Sinon une collection de dictionnaires suffirait à parler les 6000 langues du monde !

Si les racines de l'espéranto sont indo-européennes, la construction de la langue, sa structure et son fonctionnement ne sont en rien ceux d'une langue comme le français et l'anglais, même si la simplicité de la grammaire anglaise a donné des idées au jeune Zamenhof .

Je suis professeur de russe et j'ai souvent l'impression que la grammaire de l'espéranto est la doublure du russe . Un jeune étudiant du Burundi m'a affirmé que Zamenhof devait connaître la langue du Burundi car le système verbal était le même !

Sans parler du principe d'agglutination ou de dérivation qui rapproche l'espéranto du hongrois ou du chinois ; mais tout ceci est très bien expliqué dans le livre de Claude Piron "*l'Espéranto, langue européenne ou asiatique*" ou celui de John Wells "*Lingvistikaj aspektoj de esperanto*" (la traduction en français existe, seriez-vous partante pour l'éditer ?)

Mais la principale erreur d'Alain Rey est de parler de l'espéranto comme d'un projet de tiroir : il aurait eu raison en 1887, mais aujourd'hui l'espéranto fonctionne, il fonctionne même très bien... toute discussion est vaine" a déclaré André Martinet.

Si l'espéranto est une des 30 langues les plus parlées au monde, c'est sans doute car il n'est étranger à personne, et surtout il ne s'impose pas , il se choisit .

Renée TRIOLLE

Bello Bauco, 694 chemin de la Civade Verte

13600 La Ciotat

Délégué permanent à l'UNESCO pour *Universala Esperanto-Asocio*

J'utilise quotidiennement l'allemand pour mon travail. Dans l'industrie du bois, comme dans d'autres domaines, les langues les plus utilisées sont l'allemand et l'italien. Je suis en rapport avec mes partenaires commerciaux dans toute l'Europe et je parle couramment l'allemand avec les ressortissants des pays germaniques, avec les danois, les slovènes, les suisses allemands, etc... (même avec certains italiens).

Baragouiner l'anglais pour trouver une adresse ou se faire servir à table est bien, mais notoirement insuffisant quand il s'agit pour les partenaires de maîtriser la même langue pour mieux s'entretenir.

Lorsqu'il s'agit de mener une négociation commerciale où il s'agit de ménager les susceptibilités (anglo-saxonnes ou latines) ou discuter de détails techniques pointus, rien ne vaut la maîtrise parfaite d'une langue. **Combien de français savent vraiment parler parfaitement l'anglais ?** C'est vrai que l'apprentissage de l'allemand est à revoir pour le rendre plus ludique et intéressant. Rien ne vaut un séjour linguistique et s'immerger pour quelques mois dans le pays pour apprendre la langue. J'ai hébergé une jeune étudiante allemande qui a passé une année scolaire en France et qui est repartie avec la mention *félicitation* sur le bulletin scolaire.

Apprendre la langue de Goethe et Schiller aujourd'hui, plutôt que l'anglais, ouvrira de nombreuses portes à l'avenir professionnel de nos enfants, pensez-y.

Nota: j'utilise un peu l'anglais pour trouver mon chemin ou lire quelques notices, sans plus, et je me régale de parler allemand avec les allemands.

Samedi 02 Juin 2007 - 22:19

=====

Aux baragouineurs...

J'enseigne l'allemand dans un collège de Strasbourg; je serai en retraite dans trois ans, et content de l'être. Jusqu'en 1990 environ, enseigner l'allemand me semblait naturel, éternel. **Puis on a introduit l'anglais en primaire et la descente aux enfers a commencé...** je suis content de quitter bientôt le bateau que des imbéciles ont fait couler. Quand à ceux qui pensent qu'on apprend une langue simplement en allant dans le pays, ou en 3 mois si on est un enfant, je les laisse à leurs illusions... Peut-être veulent-ils dire "baragouiner"? **Un élève de terminale a 13 ou 14 année d'études de sa langues écrite derrière lui... :-)** et pourtant son niveau écrit et oral sont souvent loin d'être géniaux... ***

Dimanche 03 Juin 2007 - 14:10

*** (NB de la rédaction de « la Informilo » : ci-dessous, l'opinion d'Alain Rey, lors d'une interview sur le site d' *evene* ...)

...Donc, le projet de Nicolas Sarkozy selon lequel les candidats à l'immigration doivent parler français, ne résoudrait rien ?



Je pense non seulement que ça ne résoudrait rien, mais je pense aussi que ça mettrait fin à l'immigration. Il est évident que celui qui a passé son enfance à parler en arabe ou en chinois ne réussirait pas une dictée française ! L'idée paraît généreuse, mais les Américains se sont penchés dessus déjà, et se sont rendu compte que déjà à l'intérieur du pays, on ne parle pas anglais de la même manière... Alors hors du pays ! **Si on veut une fixation de normes et de critères uniques, même si elle est souple, ça ne marchera pas**

car les conditions ne sont jamais les mêmes. Ce n'est pas la même chose de savoir parler une langue et de faire une bonne dictée, même à l'intérieur de la communauté française. Rien qu'en Alsace ou en Corse, ce ne sera pas la même chose...

pri rekorda eldonaĵo

Ĵus aperis ĉe la renoma germana eldonejo *Buske* la monumenta preskaŭ dumil-paĝa (1679... !)

"Grosses Wörterbuch Deutsch-Esperanto"

de Erich-Dieter Krause

Erich-Dieter KRAUSE estas emerita profesoro pri la indonezia lingvo ĉe la universitato de Leipzig en Germanio kaj vortaristo kaj leksikografo pri la indonezia kaj Esperanto. Li estas membro de la *Akademio de Esperanto*.

La verkego estas fortike bindita kaj pli granda kaj preskaŭ duoble tiel dika kiel *Plena Ilustrita Vortaro*. Ĝi enhavas 160 000 kapvortojn, kaj pro tio estas plej granda dulingva vortaro de Esperanto.

Tiu ĉi vortaro estas la rezulto de 40-jara leksikologia kolektado kaj esplorado de plej variaj Esperanto-tekstoj el ĉiuj partoj de la mondo. La klara aranĝo de la kapvortaj artikoloj, la aldono de vasta gamo da indikoj pri faklingva uzo kaj aldonaj vortklarigoj faras la vortaron facile uzebla por kiu ajn.



Prezo : 128 eŭroin + afranko

Pri varbado

En nia listo de ĉiujaraj klopodoj sparkas la demando : Kiel plie varbi ? Sciante, ke afiŝoj ne bone efikas, oni kutimas preterlasi tiun varbilon. Ni ja plue povas bedaŭri la altan prezon de koloraj, aĉetebblaj afiŝoj. Tamen ni bone konscias pri io : nepras, ke la publiko ne forgesu la ekziston de *Esperanto* !

Kial ne provi regulan surgluon de afiŝo en strategiaj lokoj, po trimestro? Povas esti malgranda, malmultekosta afiŝeto, nura duobligajo.

El inter la taŭgaj lokoj estas biblioteko, junuldomo, kvartaldomo, popoluniversitato, liceoj, ...

Nome de mia grupo, mi verkis plurajn afiŝetojn je formato A4, kiuj trovis lokon en la cititaj domoj. Mi proponas al vi ses diverstemajn ekzemplerojn kontraŭ havigo al mi de 6 poŝtmarkoj. Vi poste multobligu ilin formate A4 aŭ A3, kolore aŭ nigreblanke, laŭbezono. Vi aldonu adreson, telefonnumeron kaj rendevuon de via propra klubo.

Armand Hubert

Ekzemplero,
sed A4-formate



La temoj de la ses afiŝoj estas :

- * Impossible de s'entendre ?
(ĉi kontraŭe)
- * Est-ce possible de mieux s'entendre ?
- * Le monde... et moi
- * Nous sommes tous d'ici mais...
- * Europe des citoyens ou uniformisation ?
- * Eveil à la citoyenneté

Mendo : Armand HUBERT
13 chemin de la Solitude
57200 Sarreguemines
(kontraŭ 6 poŝtmarkoj)




Avez-vous essayé
l' ESPÉRANTO ?

www.esperanto.france

DÉCOUVERTE de l' ESPERANTO

....



Travivaĵo :

Antaŭ nelonge mi vizitis « salle des professeurs » en najbara liceo. Surprizite mi konstatis, ke eta afiŝo, kiun mi postlasis antaŭ unu jaroj, ĉiam ĉeestas.

Neniu inter la instruistoj trovis la vojon por aliri Esperanton; neniu ankaŭ forigis la varbopaĝon.

Tri hajkoj :

Je pluvveter' tia
mi hejmenresti elektas -
vojiru heliko !

En mia kava dent'
jen grenero koriandra :
jen vojaĵ' al Orient'

Solece heliant'
aliflanken rigardas -
ĉu lunon serĉanta

(ĉu esperantista specimeno ?)



SEN LIM' ĜIS ...

LA KODISKO :

Verda plezuro : kelta roko rakontanta la vojaĝdezirojn de fraŭlino.

La birdinfanoj : balado parolanta pri vundoj de infanaĝo, akompanita per harpo.

Freneza semajno : infanludkanto el afrika inspiro por tradiri la semajntagojn, per balafono, elektra gitaro, harmoniko.

Bonŝancon! : lantroka kanzono bondeziranta al infanoj bonŝancon en la vivo.

Sinjor' Rubsak' : pri temo "ĉu ni preferas nutraĵon aŭ ĝian pakadon ?". Latinfunka kanzono.

Kie ? : elnombradkanzono kiel itala tarentelo, per mandolino, fluto, tubjo, gitaroj, kaj perkutiloj.

Trinku kaj kantu : kiel ĝia titolo ne indikas, eĵra kanzono pri akvoprezado kaj al kiu ĝi profitas. Biertrinkeja etoso.

Esti si : ĉeĉeneca kanzono pri elementoj kaj konscio.

Napokapo : *repo*. "Estante neniam kiel tiuj napokapoj kiuj kunportas haton kaj furiozon sur tero mi deklaras min menssana. Ne preĝu por mi. Dankon."

La amvarbantoj : instrumenta peco, konceptohava kaj kineca, per monofoniaj sinteziloj de la 70aj jaroj.

Tri katidoj : ĵaza fantazio kun tri voĉoj pri la aventuroj de tri katetoj.

La parado de la literoj : infanludkanto fanfare por lerni la alfabeton.

⇒ LA ANTAŬMENDO DE LA DISKO ESTAS GRAVA SUBTENO POR ĜIA APERIGO !

Dank'al via mendo, la mem-produktado kaj malgranda buĝeto ne malhelpas profesionan kvaliton !

Ni proponas al vi diversajn eblecojn subteni nin :


- 1 KD : 13 € (+ sendkostoj: 2,20 ₣)
- 3 KDoj : 36 € (+ sendkostoj: 5,50 ₣)
- 5 KDoj : 55 € (+ sendkostoj: 6,50 ₣)
- kaj pli ol 5: 11 € la KD (+ sendkostoj : 6,50" € pli ol 10 : 7,50 €)

Se vi volas registritan sendon, aldonu 2,50 €. La indikitaj sendkostoj estas nur por Francio. Por aliaj landoj bonvolu kontakti nin. Sendu vian ĉekon (KD-prezon kaj sendkostojn) al :

COMPAGNIE DOUBLE-UN
Avenue Adrien Fayolle
FR-26400 CREST France

Krom la 45 minutoj da muziko, legebla parto estas antaŭvidita sur la KD, kun kelkaj partituroj.

DOUBLE-UN ont enregistré ce printemps 2007 leur 1° disque en espéranto.



12 morceaux originaux de la comptine à la chanson engagée, sur des musiques évoquant notre vaste monde.

SEN LIM' ĜIS... (sans frontière jusqu'à ...), LE DISQUE:

Verda plezuro (Vert plaisir); *La birdinfanoj* (Les oizenfants); *Freneza semajno* (Une semaine folle); *Bonŝancon!* (Bonne chance !); *Sinjor' Rubsak'* (M. Sac poubelle); *Kie ?* (Où ?); *Trinku kaj kantu* (Bois et chante); *Esti si* (Être soi); *Napokapo* (Tête de con); *La amvarbantoj* (Les dragueurs); *Tri katidoj* (Trois chatons); *La parado de la literoj* (La parade des lettres)

COMPAGNIE DOUBLE-UN Avenue Adrien Fayolle 26400 CREST 33 (0)475 25 17 15 doubleun@wanadoo.fr

LA PRÉ-VENTE DU DISQUE EST UN APPORT IMPORTANT POUR SA SORTIE:

grâce à votre commande auto-production et petit budget n'empêcheront pas une qualité professionnelle !

Nous vous proposons différentes possibilités pour nous soutenir

- 1 DISQUE : 13 € (frais d'envoi 2,2 €)
- 3 DISQUES : 36 € (frais d'envoi 5,5 €)
- 5 DISQUES : 55 € (frais d'envoi 6,5 €)
- et + 11 € la galette (frais d'envoi 6,5 F, + de 10 : 7,5 €)

Si vous souhaitez un envoi recommandé, ajoutez 2,5 €. Tarif pour la France. Pour l'étranger nous contacter

Votre chèque (disque(s) + frais d'envoi) à l'ordre de : COMPAGNIE DOUBLE-UN

Notre adresse : COMPAGNIE DOUBLE-UN Avenue Adrien Fayolle 26400 CREST




El nia libroservo


Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la 61 an regionan staĝon de esperanto en Saales la 19/21 ajn de oktobro 2007 Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu gxin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE



Nove alvenintaj libroj



- 1) **Lingvo kaj popolo**, lingvopolitiko, 160 p, **Tonkin, .U.E.A. 14,10 €**. Pri la aktualaj problemoj de la esperanto-movado.
- 2) **La paŝo senelirejen**, romaneto, 44 p, **Codjo F.E.L. , 6,00 €**. Rakonto el Benino
- 3) **Dialogo inter surduloj**, romaneto, 52 p, **Codjo. F.E.L., 6,00 €**. Dua rakonto el la sama aŭtoro kiel la antaŭa libro.
- 4) **Biblio**, 1378 p, **Opo, KAVA-PECH., 19,80 €**. Nova eldono de la plej presita kaj traduka libro de la mondo en tre bela prezento. Tradukoj de Zamenhof, Bevering kaj brita komitato.
- 5) **Esperanto por infanoj 2**, Instrulibro por infanoj, 104 p, **Melicharkova, KAVA PECH. 6,00 €**. Nova eldono de belela instrulibro por infanoj enhavanta 21 lecionojn kaj 17 rakontetojn. Destinata unue al ĉekaj lernantoj gxi famiĝis en la tuta mondo!
- 6) **Gramatiko de Esperanto**. Gramatiko, 142 p, **Malovec, KAVA PECH, 13,50 €**.. Detala studado de diversaj gramatikaj punktoj sur naŭ kampoj : Lingvoevoluo, fonetiko, ortografio, vortfarado, morfologio, sintakso, votprovizo, stilistiko, tradukado.
- 7) **Neokazinta amo Novelo**, 150 p, **Karpunina, F.E.L., 15,00 €**. 15 noveloj de la rusa verkistino de "la Bato"
- 8) **Ĉio fareblas, Infanlibro**, 18 p, **De Detigny, POUR PENSER, 6,00 €**. Ilustrita infanlibro tradukita de Martine kaj Christian Rivière.
- 9) **Martin kaj la Talpoj**, k-Disko, **Vinilkosmo, 15,15 €** 12 kanzonoj.

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
 - per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

- S-ro/ino
-
-
-

En

la

Subskribo:

Intervjuo: En nomo de MUCHA: Geraldine Muchová

Nia bulteno La Informilo jam menciis la faman pretriston kaj grafikiston Alfons Mucha. Tiam nia amiko Roberto Kueny, ŝatanto kaj kolektantoj de liaj pentraĵoj, eĉ verkis artikolon pri li kaj prezentis kelkajn bildojn.

Pli poste ankaŭ aperis artikolo pri la filo de Mucha, Jiří Mucha. Kiel li sukcesis diskonigi la verkojn de sia patro en malfacila post-milita periodo.

La sekva traduko prezentas intervuon de la edzino de Jiří Mucha, Geraldine Muchová fare de la redaktoro Alena Plavcová por la gazeto PÁTEK.

La tradukon el la ĉeĥa lingvo prizorgis nia konstanta kunlaborantino Jana Cířhová, kiun ni kore dankas pro eltrovo de interesaj artikoloj kaj pro ŝia preteco ilin traduki por "La Informilo".

André Grossmann



Devene naskiĝinta Skotlandano Geraldine Muchová (89) studis muzik-komponadon en Reĝa Akademio en Londono. Kun Jiří Mucha ŝi renkontiĝis en 1941 en Anglio. Post milito ili alveturis Pragon, en 1951 Jiří Mucha estis akuzita pri spionado kaj enkarcerigita por 6 jaroj, en 1954 liberigita. En 1948 naskiĝis la filo John. En la 70-aj jaroj vivis Geraldine en Skotlando, Jiří aranĝadis eksterlande ekspoziciojn de la verkaro de sia patro. Post morto de Jiří en 1991 Geraldine kaj John fondis fondajon, kiu administras la belartaĵojn de Mucha. En 1998 en Prago estis malfermita la muzeo de Mucha en Panská-strato, kiun antaŭtempe vizitis la 1.000.000-a vizitinto. Ekde la jaro 1989 Geraldine Muchá vivas denove en Prago kaj kune kun la filo daŭrigas en prezentado de Mucha-verkaro en la tuta mondo. John havas 3 gefilojn. La plej aĝa Marcus (26), kiu plej multe interesiĝas pri la verkaro de sia avo, skribas film-scenariojn, Andrew vizitas muziklernejon, la filino Tamzin studas en Cambridge.

El gazeto PÁTEK : Alena Plavcová, redaktoro

Geraldine Muchová: Mi piedpuŝetas ursofelon, tiom bone konatan dum 10 jaroj de malnovaj fotografajoj el pariza ateliero en strato « rue 6 du Val-de-Grâce ». Super senplumiĝinta raba besto staras legenda grandega spegulo en ora kadro de Mucha. La originalo de plakatoj-afiŝoj de « DAMO kun kamelioj » aŭ de « MEDEA » estas pli grandaj, ol mi imagis. La harmoniumo, kiun ludis Gauguin. Barokstila altaro. Vandoj kun bildoj de Mucha, antikvaĵoj, sankrestaĵoj, remburistaĵoj.

Kiel tion priskribi? Superrealisma revu. Io inter kastela bildgalerio, deponejo, brokantejo kaj kabineto de kuriozaĵoj. Ja tio ĉi tie odoras kiel en la muzeo. Kaj en aero kvazaŭ ŝvebus reeĥo de legendaj vivoplenaj vesperetoj el tempo de la diktatoreco. En la domo en HRADČANY apartenanta al kapitulo de Sankta Vito, laŭdire iam loĝis Jan NEPOMUCKÝ. Hodiaŭ ĉi tie meze de libroj de Jiří Mucha, ŝia edzo kaj pentraĵoj de ŝia bopatro Alfons Mucha vivas eta virino, kiu mem fariĝis legendo, Geraldine Muchová « Ĉu vi scias, kiomaĝa mi estas? » ridetas la muzikkomponistino parolante ĉeĥlingve kun ĉarma angla

akcento. « En somero mi estos 90-jaraĝa! » En tiu ĉi aĝo ne necesas ion kaŝi. Laŭdire ŝi estas tre feliĉa, ke ŝi vivas meze de tiom belaj objektoj. » Nur la kuirejo estas en partero. Ĉi tie mi ne supozis, ke vi ne havos servistinon. » Ŝi dormas en malantaŭa ĉambro, en antikva elskulptita lito kun baldakeno, en kiu laŭdire estis murdita Albrecht el Valdstejn. « Ĝi estis 50 jarojn nia geedza lito ».

Redaktoro: Origine vi estas Skotlandano. Ĉu vi ankoraŭ rememoriĝos, kiun ĉeĥan vorton vi kiel la unuan ellernis?

Geraldine Muchová: Tion de mi ne plu scias, sed certe ĝi estis ia vulgara vorto. Jirka estis tiam en 1941 en Anglio ĉe aereskadrono, sekve de tio min ĉeĥan lingvon instruadis ĉeĥaj aviadistoj. Sed en 1945, kiam ni kun Jirka forveturis Ĉeĥoslovakion, mi jam tute perfekte bone parolis ĉeĥe. Eĉ kiam mi ekzemple ĉiujn alparoladis ci, ne vi.

Redaktoro: Kiam vi ekkonis Jiří Mucha-on, ĉu vi sciis, ke li estas filo de famekonata pentristo?

Geraldine Muchová: Tute ne. Pri Alfons Mucha tiam en Anglio preskaŭ neniu aŭdis. Kaj iom da homoj, kiuj pri li sciis, tiuj sciis, ke li estis samtempulo de Toulouse-Lautrek, do ili tute ne ekhavis ideon, ke li povus havi junan filon.

Redaktoro: Kiel vi propre konatiĝis?



Geraldine Muchová: *Temis pri absoluta hazardo. En la jaro 1941 Anglio atendis invadon, ĉiuj je ĝi preparadis sin, loĝantoj de suda marbordo estis jam evakuitaj. Mi havis 2 maljunajn onklojn, kiuj ankaŭ transloĝiĝis en la enlandon. Ili loĝis en Lemington. Kaj apud Lemington estis tendaro por junaj homoj, kiuj sukcesis fuĝi el okupata Eŭropo, de plej diversaj naciecoj. Mi tiam studis en Londono ĉe Reĝakademio la komponadon. Kaj mi decidigis viziti miajn onklojn. Apud unu barako ni ekaŭdis muzikon kaj sur la trotuaro staris viro en franca uniformo, kiu ankaŭ estis invitita kaj li estis Jirka. Estis tio amo je unu ekvido. La gepatroj prijuĝis, ke li, aviadisto, la militon plejble ne supervivos, do ili diris : ke ni trankvile geedziĝu !*

Redaktorino: Kiel lin akceptis via familio ?

Geraldine Muchová: *Nu, tio estis preskaŭ tragedio ! Por ĝi li estis absoluta fremdulo, dum milito ne estis eble ekkoni, kiu li ja estas. Londono estis ĉiutage bombardata. Ni kun Jirka restis en Londono dum la tuta milito, li laboris kiel raportisto de BBC.*

Redaktorino: Kion vi tiam sciis pri Ĉeĥoslovakio ?

Geraldine Muchová: *Preskaŭ nenion. Smetana, Dvořák sciis ĉiu. Kiel studentinon de komponado pli poste min ekinteresis Janáček, tiam tute nekonata komponisto, pri kiu atentigis min mia profesoro : » ekzistas unu terure interesa komponisto, Ĉeĥo, JANÁČEK... »*

Redaktorino: Kiam vi post la milito vivis en vilao de Mucha en Bubeneč kun patrino de Jirka, via bopatrino, ĉu ŝi al vi rakontadis pri Alfons Mucha ?

Geraldine Muchová: *Ŝi pri li parolis ŝate kaj senĉese. Ŝi havis tian vivecan manieron de rakontado, ke al mi ŝajnas, ke mi lin efektive konus, eĉ kiam li mortis en jaro 1939. Alfons estis vere trankvila homo kun profunda voĉo. Bopatrino, tre edukita virino reganta kvin lingvojn, ŝi diradis, ke Alfons ĉiujn emociojn sat-furiozigis en laboro, en pentrado. Li estis absolute sindonema al sia belarto. Li devenis el tre malriĉa medio kaj devis esti vere talenta, ĉar praktike tranokte fariĝis famekonata, antaŭ ĉio pere de la siaj aĵoj. Lia vivo estis nekredebla. Io kiel la fabelo pri malsaĝa HONZA, kiu finfine akiros la princinon kiel sian edzinon.*

Redaktorino: Kiel vi travivadis, kiam oni lin du jarojn pli poste akuzis pro spionado kaj kiam oni lin enkarcerigis por 6 jaroj ?

Geraldine Muchová: *La prokuroro ja por li postulis la mortpunon. Kiam oni lin arestis, al ni oni forprenis aldonajojn je manĝaĵoj, mi restis tute senrimeda kun du-jaraĝa filo. Por la bopatrino estis tio ankoraŭ pli malbona, ĉar ŝi kutimiĝis je io tute alia. Ŝi perdis ĉiun monon. Sed mi estis nur unu inter la multego da aliaj, nenio eksterkutima. Finfine mi havis ŝancon, ĉar la eldonejo MELANTRICH necese bezonis iun, kiu scipovas fari korekturojn de muzik-partituroj. Ili volis eldoni rapide novan eldonon de Anton Dvořák, ĉar finiĝis lia « kopirajto », tiuj ĉi korekturoj estas terura laboro, neniu ĝin volas fari. Sed mi estis feliĉa, ke la estro de la eldonejo al mi ĉi tiun laboron donis, Šebánek, mi lin hazarde konis. Ĉar oni supozis, ke : kiel virino de spiono scipovos nur nutri kokinojn*

aŭ ion similan. El mia honorario kun malgranda John ni vivis.

Redaktorino: Kiel vi al li eksplicis, ke la patro subite malaperis ?

Geraldine Muchová: *Mi ne volis al tiom malgranda bubo klarigadi, kio ververe okazis. Li tion ne komprenus. Do mi diris, ke li ricevis laboron en fabriko kaj pro manko de tempo ne povas iradi hejmen. Kaj li tion kredis estante feliĉa, ke li havas tiom gravan patron. Sed estis homoj, kiuj tion al mi riproĉis, laŭdire mi devis al li diri la veron. Al 2-jaraĝa knabo ! John-on kiel filon de la spiono oni eĉ ne volis preni, akcepti en la patrin-lernejon, laŭdire li ne rajtis je tio. Sed finfine la direktorino riskis kaj lin akceptis. Temis pri kvartalo POHOŘĚLEC. La tipon pri tiu lernejo donis al mi Lobkovic-oj. Tiam sur la Malostranské náměstí en numero 11 vivis iaj Lobkovic-oj, kiuj havis 2 malgrandajn infanojn. Kiel aristokratoj ili ankaŭ « havis krustaĵon ». En tiu ĉi lernejo John havis almenaŭ 1 tage varman manĝaĵon.*

Redaktorino: En la 50-aj jaroj estis danĝere. Kiel rilate al vi la homoj kondukis ?

Geraldine Muchová: *Multaj homoj timis kontakti min. Sed la aliaj min helpadis. Kelkaj kredis, ke mi ĉi tie ne eltenos, sed estis tiom da aliaj, kiuj havis pli malbonajn problemojn ol mi, mi ne rajtis multe lamenti.*

Redaktorino: Kial vi propre ne elmigris ?

Geraldine Muchová: *Jirka tion decidis jam en 1948. Kiamaniere li povus elveturigi la patran kolektaĵon ? Propredirite pro lia verkaro li ne elmigris eĉ, kiam li sciis, ke oni lin arestos.*

Redaktorino: Ĉi vi tiam devis vendi ian pentraĵon por la vivtenado ?

Geraldine Muchová: *Nu, tio eventuale koncernus mian bopatrinojn. Ŝi povis ekvendadi, sed ŝi tion ne realigis. Ŝi volis, ke la aĵoj kunteniĝu.*

Redaktorino: Kialingve vi parolis kun John en lia junaĝo ?

Geraldine Muchová: *Ĉeĥe ĝenerale... aŭ ne ? Kaj sciui, mi tion ne plu scias. Eble ĉeĥe.*

Redaktorino: Ĉu vi timis ?

lom ŝi silentas.

Geraldine Muchová: *Timi ? Mi ne kutimas timi, mi ne scias kial mi devus timi. Nur pri John, ĉar iom elkreskinta, li ofte fuĝis sur la straton, kie li vagadis.*

Redaktorino: Ne estas sekreto, ke John kaj lia patro ne tro interkompreniĝis. Kial ?

Geraldine Muchová: *La du tute ne interkompreniĝis. Kiam John naskiĝis, Jirka estis feliĉa, sed reveninte el la karcero, li renkontis 6-jaran orharan knabon kaj estis seniluziĝinta, ke li ne havas talentohavan infanon. Kaj John – krom tio – havis ion, kion Jiří ne ŝatis. Li estis tre prudenta, li ne estis la tipo de knabo, kiu ĉion tuj ekas, li ĉiam unue volis scii, kio kaj kiel. Kaj tio al Jiří ne plaĉis, tio lin ĝenis. « La knabo, li certe fariĝos burokrato » ! Ili estis du*



tute malsamaj personoj, karakteroj. Nur en 1966 John elmigris kiel 18-jaraĝa Anglion, li vivis ĉe sia patrino, tie finis studadon kaj fariĝis bankisto. Kaj kiam Jirka en 80-aj jaroj bezonis ian financan konsilon, tiam estis John por Jiří « bona ». Li subite vidis, ke li ne estas tiu idioto kiel li lin konsideris.

Redaktorino: Tiu ĉi loĝejo sur Hradčanské-placo estis famkonata pro salonego, kie dum totalisma reĝimo okazis vivoplenaj amuzvesperoj. Kiel vi ilin nun rememoras ?

Geraldine Muchová: Kun tiuj amuz-vesperoj John ne kunsentis, sed mi kunpaciĝis.

Redaktorino: Ĉu vi kunpaciĝis kun tio, ke Jiří Mucha estis bonvivanto (kun kiu vi travivis 50 jarojn), kiu sciis eluzi la vivon ? Kiel vi kvitis kun liaj amikinoj ? Kun lia nelegitima filino ? Ĉu vi ne emis eksedziniĝi ?

Geraldine Muchová: Ne. Li estis, kiel al vi diri, al li ĉiuj enamiĝadis, ĉar li havis egan ĉarmon. Sed mi ĉiam, kiam mi sentis pezon, rememoriĝis, kia homo li ja estas.

Ĉar Jirka bezonis vojaĝadi pro organizado de patraj ekspozicioj en la mondo, sen elvojaĝa aldonaĵo tio estis tiam neebla, iu al ni konsilis: se mi transloĝiĝus en Skotlandon, Jirka povus laŭleĝe peti pri vizito de sia edzino en komuna mastrumo en Skotlando. Do por certa tempo mi forveturis kaj tio vere funkciis. Eĉ kiam Jirka neniam veturis en Skotlandon ...

Nur de tempo al tempo. Sed ni renkontiĝis eventuale en Parizo aŭ Japanio. Dank'al Jiří la verkaro de lia patro komencis esti pli konata kaj ĉiu, kiu venis al Prago, volis vidi Mucha-on. Ĉiuj venadis viziti nin hejme. Venis multaj verkistoj, pentristoj, belartistoj, filmaktoroj ktp. Ekz. Peter Ustinov, Arthur Miller, eĉ la princo Charles, ia nobelaro el Germanio lin al ni venigis. Kiam en Prago en 1996 estis la reĝino Elisabeth la IIa, oni min invitis. Ni estis prezentitaj kaj la princo Filip diris ĉeĥe « Dobrý den » Jiří Mucha post novembro aperis sur listo de STB sub pseŭdonomo ANTY. Sed pri tio li neniam kun mi parolis. La komunistoj lasis lin organizi la ekspoziciojn de sia patro, ĉar tio portis al ili malmolan valuton. Li aranĝis tion nekredeble, li trovis sponsorojn, la pentraĵojn-bildojn veturigadis sub malnova litkovrilo en aŭtomobilo. Sekve de tio iaj kredis kaj pensis, ke tio ne estas ebla, ke tio estas nur kaŝilo por io alia, kion li fakte faras en 50-aj jaroj, kiam Jiří estis antaŭtempe liberigita.

Redaktorino: Via filo John foje diris, ke la patro eble subskribis kunlaboron kun STB interŝanĝe por sia antaŭtempa liberigo.

Geraldine Muchová: Ili poste mem nuligis la kunlaboron, ĉar el ĝi ilin neniam profitis. (En 1963 STB nuligis kunlaboron kun Jiří Mucha, ĉar « li transdonadis nenian informojn ».)

Redaktorino: Kun kio vi ne povis kunpaciĝi en socialisma Ĉeĥoslovakio ?

Geraldine Muchová: Kun envio. La envio estas ja tiom superflua kaj ĉion difektas. Kun ĝi kune venas la malamo. Kaj ĉeĥoj tion scipovas sufiĉe bone. Mi tiom iam sentas ie, eĉ kiam mi ĝin ne tro atentis. La homoj ne konsciiĝas, se oni havas surŝultre ion similan kiel ni tion havas, kia zorgo tio estas ! Tion oni devas flegi, purigadi, gardi. Kaj mi tion ŝate faras. Kaj kion alian

mi ĉi tie ankoraŭ faras ? Kaj temas pri okazintaĵo, kiel ekkonadi interesajn homojn.

Redaktorino: Kion el la verkaĵoj de A. Mucha vi pleje ŝatas ?

Geraldine Muchová: Mi estas lia granda favorulino. Neniam mi forgesos, kiel mi la unuan fojon enpaŝis lian atelieron en la Bubeneč-vilao, kiam ni kun Jirka post milito venis al Prago. Sur unu duobla ŝtupetaro estis « Madona kun lilio », tiu estas ĝuste nun en Stockholmo sur ekspozicio. Tuj apude estis granda oleopentraĵo « Sibir ». Mi estis absolute ŝokita, ĉar tiatempe ĉiuj liaj pentraĵoj estis nekonataj, ĉiuj konis nur liajn afiŝojn. Liaj belartaĵoj estis konsiderataj malnovmodaj, neinteresaj, tial dum la milito nenio perdiĝis, neniu pri tio interesiĝis ! Propre dank'al tio ĝis hodiaŭ ĉio estas kune, plejparte, la bildoj estas malserenaj, li gardis ilin nur por si mem, al neniu li ilin montradis.

La afiŝojn de Mucha kolektadas ekzemple Ivan Lendl kaj havas preskaŭ ĉiujn. Nur unu eĉ ni ne havas : tiun al Rosemary de Triml. Ĝi mistere malaperis ! Lendl ja speciale eĉ domon en Ameriko konstruis por tiuj ĉi afiŝoj. En tempo, kiam li gajnadis grandan monon, li konatiĝis kun Jirka kaj tiu al li donadis konsilojn. Tion Jirka ŝate faris, ĉar li volis, ke la verkaro de Mucha vendiĝu eble eĉ je aŭkcioj, kie ili finas. Sed por Lendl tio ne estas nur investita mono (bone investita), estis tio lia ideo, li amas Mucha-on. Mi renkontiĝis kun li, li estas tre afabla homo, sed nun li preferas golfon.

Redaktorino: Ĉu estas vero, ke vi dormas en kuŝejo (lito), en kiu estis murdita Albrecht el Valdštejn ?

Geraldine Muchová: Versimile jes, sed la lito ne havas ion komunan kun Alfons. Ĝin aĉetis Jirka kaj estis dum la tuta vivo nia geedza lito. Ĝi devenas el postheredaĵo de Ema DESTINOVÁ kaj ŝi tion certigis. Mi ĉi tie vivas ŝate meze de tiaj objektoj. Mucha multe gajnadis, sed ankaŭ multon elspezis. Kaj poste ĉio transloĝiĝis, sed ankaŭ multon elspezis. Kaj poste ĉio transloĝiĝis el Parizo al Bubeneč kaj pli poste ĉi tien. Kaj mi meze de tio vivas. Ekrigardante tiun ĉi harmonikon mi scias, ke ĝin ludis Gaugin. Mucha estis lia kamarado, ja ĉe li laboris, ĉar ne havis en Parizo sian atelieron.

Redaktorino: Vi estas muzikkomponistino, ĉu vi ankoraŭ komponas ?

Geraldine Muchová: Jes, de tempo al tempo. Ĝuste nun mi komponis ion por ĉi-tiea flutisto. Sed plej bone mi laboras, kiam mi pro io koleras. En mia muziko estas ĉiuj miaj ĝemoj, ĝi estas nome mia defenda ŝildo.

Ĉion mi travivis dank'al amo. Kaj poste : por la muzikisto vere ne ekzistas pli konvena lando ol Ĉeĥio. Kredu !



... ni prova rideti! ...



Maljuna paro renkontas amikojn, kiujn ĝi ne vidis dum multaj jaroj. "Kio nova pri vi? demandas unu amiko

- Nu, ni ĵus enpartoprenis dum tuta semajno staĝon por restimuli la memorkapablecon. La fakulo, kiu gvidis ĝin eltrovis tutnovan metodon tre efikan.

- Bone, jen afero, kiu ankaŭ nin interesas... Kiel nomiĝas via instruanto?

- Hem... li nomiĝas... li... Atendu! Bonvolu rememorigi al mi la nomon de tiu bela floro, kies parfumo pleje agrablas, kaj kies tigo portas domojn...!

- Sed, temas pri rozo!

- Jes ja!..." Li turnas sin al sia edzino:

"Rozo, ĉu vi notis la nomon de nia staĝgvidanto?"

Fiŝkaptisto sidas kviete ĉe la riverbordo, kiam alvenas subite ŝvitanta viro...

"Ĉu vi ne vidis preterkuri virinon, blue vestitan, kiu time mienis? Temas pri mia edzino..."

- Jes, ŝin mi ekvidis antaŭ apenaŭ unu minuto!

- Bonŝancon mi havas, ŝin mi feliĉe povos reatingi...

- Certe, tiom pli ke ĉi tie la akvo fluas malrapide..."

En kafejo, viro rakontas...

"Lastsemajne mi sidis ĉe la riverbordo, por fiŝkapti... Mia dekjara filo akompanis min... Post longa, senrezulta momento mi konstatis, ke mankis la kutimaj allogaĵoj por fiŝoj... Nu, mi al kroĉis ĉe la hoko paper-slipeton, sur kiun mi skribintis „vermo"... kaj mi ekdormis! Kредu min, kiam mi vekigis, la hokfadenon tremis... mi tiris... kaj ĉe la hoko mi malkovris slipeton sur kiu mi legis ... „fiŝo"!...




Sincere dirite, ĉu vi ridetis?

Johaneto plendas ĉe sia onklino... „Hundon mi ŝatus havi, sed panjo malkonsentas, pro la malpuraj piedoj..."

- Kaj paĉjo?

- Nenia problemo koncerne lin... Li ĉiam demetas la ŝuojn en la koridoro antaŭ ol eniri la salonon".

Unu el la inventaĵoj de la Ŝadokoj...



...pluu-ombrela por varma vetero

Direktoro de uzino, malŝatata de ĉiuj laboristoj, devas eniri hospitalon. Je sia ega surprizo li ricevas viziton de unu el la dungistoj... Iom emociigita, li dankas;

"Vera ĝentileco, kara Ludoviko... Mi supozas, ke vi venis je la nomo de ĉiuj viaj kolegoj?"

- Jes, sinjoro... Ni lotis por malkovri tiun, kiu devis viziti vin kaj mi perdis!..



La patro rehejmiĝas post la labortago kaj malkovras la edzinon, kiu nerveze piedumas en la kuirejo. Grumblante ŝi raportas;

"Via fileto malbone kondukis, mi eĉ devis dediĉi al li vangofrapon!"

- Nu, kiu li estas?

- Li kasiĝis sub sian liton!..."

La patro kaŭriĝas kaj rampante alproksimiĝas je la knabeto, kiu duonlaŭte kaj komplete pridemandas... „Nu, paĉjo, ĉu ankaŭ vin ŝi volas bati?"...

Kuracisto eliras el sia kosultejo kaj alparolas la edzinon de sia paciento;

"Mi ne ŝatus la vizaĝon de via edzo..."

- Ankaŭ mi ne, sinjoro Doktoro... sed eksci, li ne ofte estas hejme, li ricevas bonan salajron kaj li kondukas agrable kun la infanoj... Jen la ĉefaj gravaĵoj, ĉu ne?

Liza, kvinjaraĝa, informiĝas je sia patrino...

"Panjo, kie vi estis kiam mi naskiĝis?"

- En la akuŝejo, karulineto!

- Kaj paĉjo?

- En la laborejo!

- Kaj mia frato?

- En la lernejo...

- Vere nekredeble... Neniu ĉeestis, kiam mi alvenis!"

Oni sonoras ĉe la enirpordo. La edzo aperas kun viŝtuko en la mano.

"Kion vi deziras?"

- Mi enketas por faka instituto pri baldaŭa balotado. La demando concernas nur la virinojn.

- Kion precize vi deziras ekscii?


- Kian kandidaton elektis via edzino?

- Ŝi senprobleme voĉdonos por mia kandidato...

- Kiu li estas?

- Mi ne scias, ŝi ne ankoraŭ decidiĝis..."





DISTRINGULO



Vertikala enigmo ———— *

Helpe de la ĉi-subaj vortaroj alfabete ordigitaj, malkovru la dektri vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj donas -denove !- humuran difinon de Alphonse Allais.

aĉo ag ano ap em ep he il lo ka la le le li lu me ne ni no no no oc ogo olo om ono ot
oz pa pe pi po ro ro sk ter to tre zo

- | | | |
|----|-----------------|--------------------------------|
| 1 | + - - + - - - - | birdo el la ordo de fazanedoj |
| 2 | + - - + - | triatoma molekulo de oksigeno |
| 3 | + - - + - - | parencino |
| 4 | + - - + - - - | seĝo |
| 5 | + - - + - - | korporano |
| 6 | + - - + - - - | aldonaĵo fine de poemo, romano |
| 7 | + - - + - - - - | mustelo kun tre valora felo |
| 8 | + - - + - - - - | rempieda marbirdo |
| 9 | + - - + - | ano de indiana tribo |
| 10 | + - - + - - - - | malmoliĝo de organo |
| 11 | + - - + - - | forta kortuŝo |
| 12 | + - - + - - | loĝanto de Nordeŭropo |
| 13 | + - - + - | spasme kaj brue elspiri aeron |

Kelkaj aliaj citaĵoj...



*La homo ne estis kreita por labori... Pruvo ?...
Tio lacigas ĝin!*

Georges Courteline

*Mia edzino kaj mi feliĉis dum dudek kvin
jaroj... ĝis kiam ni renkontiĝis!*

Sacha Guitry

*Danĝera aŭtostiranto estas tiu, kiu
preterveturas vin, spite al via propra strebado
por malebligi tion al li!*

Woody Allen

*Ĉiujare estiĝas pli kaj pli da stultuloj... sed ĉi-
jare estas rekordo, mi opinias, ke stultuloj de
la proksima jaro jam alvenis !*

P. Timsit !

Stvbrnz ———— *

Sub tiu kodigita teksteto vi povos malkovri humuran aserton de alia franca jurnalistoj, Alfred Capus. kiu famiĝis cetere pro siaj "bulvardaj" teatraĵoj... Li membriĝis en la Franca Akademio en 1914.

Ĉiuj literoj estas anstataŭigitaj per aliaj... Ekzemple, ĉiuj a de la citaĵo fariĝis d en la enigmo kaj ĉiuj e fariĝis m.




M h ĝ c e s d e p c k ĉ f z , h c n z ĥ m r d s d e e n o m k c ĵ c
i g n k d z ĥ p c k f z ĥ e d ĉ s m ĉ i m , h c n z i k m o m k d e b m b
c j c e ĉ ĥ d g n ĥ n e f g d : s m ĉ d e i k c p c k ĉ f z o c b m
g d z .


Solvoj de la lastaj enigmoj (137)

Vertikala enigmo: *Kafo estas trinkaĵo, kiu dormigas, kiam oni rezignas pri ĝi !*

Mistera krado: *Esti stulta entenas avantaĝon, ĉar ni ne konceptas, ke tia ni estas !*



Ne miskomprenu !... Ursula tute ne aludas nian amikon Bernard, kiu trejnas por Eo-cirko, sed ŝi montras surgrimantajn sportulojn, kiuj defias vertiĝon ĉe abrupta rokvando de "Trifels".



Ĉu eblos surgrimpi tiun gigantan ŝtonegon ? Nu, antaŭ provi, ni akiru necesajn kaloriojn... Se Violette elektis flam-kukon, ŝajnas, ke Bruno fidelas al tradicia lorena kiŝo...

Printempa Semajno Internacia

Familia Renkontiĝo okazinta la
2-9ajn de aprilo 2007 en Bonn



PSI okazis ĉi-jare en Bonn la urbo de la fama komponisto Beethoven. Ĉiuj povis komforte loĝi en la domo Venus-Berg kaj surloke ĝui ĉiujn aranĝojn.

PSI estas la printempa ferio-semajno iom simila al IF Internacia Festivalo en jarfino. Ĝin partoprenas familioj kun infanoj. Tial ĝi proponas apartajn programojn por infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj. Matene eblas elekti inter prelego, MAZI-kurso, manlaboro, ktp. en la posttagmezo estas proponataj diversaj tre allogaj ekskuzoj.



En Ahrweiler ni malkovris la restaĵojn de granda kampara vilao el la romia epoko. Jen fresko de romia banejo. Post vizito al urbo Linz, la organizantoj planis revenon per ŝipveturado sur la Rejno al Bonn..



En Brühl ni vizitis la kastelon Augustusburg kaj ties ĝardenon. Ambaŭ apartenas al la artaĵo de la germana Rokoko.

PSI okazas en la semajno antaŭ Pasko. Tial dum la Paska dimanĉo, la infanoj estas invitataj traserĉi en la parko la paskajn ĉokoladaĵojn. Ili estas poste kunigitaj kaj iom lude disdonataj al la infanoj fare de oficialaj "Pasko-Leporoj".

